



CGC N°
00406 504/1000-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA - DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 - AP. 73
Telefone 4-8033
11.100 - Santos (SP)

ABRIL DE 1979

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

BOLETIM Nº 44

REDAÇÃO: — Maria Almada

KAMPANJO DE BKE POR AĈETI SIDEJON EN BRAZILJA

Ĉar la 66-a UK estas programita por Brazilja, kio estis konfirmita de UEA, ni bezonas nepre havi sidejon en nia ĉefurbo. Estas necese havigi lokon, kie la esperantistaro povu renkontiĝi, labori kaj instrui la lingvon. Multaj personoj vojaĝas al nia ĉefurbo kaj nescias kien iri. Ni havos la sidejon je dispono de ĉiuj esperantistoj. Ni petegas ĉiujn helpi nin, ĉar post unu jaro kaj duono nia lando akceptos vizitantojn el la tuta mondo.

Gis nun aliĝis 15 personoj, kio signifas Cr\$ 150.000,00.

Ni antaŭdankas ĉies helpon.

Novaj aliĝintoj: Claudio Zimmermann, Antonio Rodrigues da Silva, Alvaro Rabelo, Elias Couto de Almeida kaj Francisco Rodrigues de Moraes.

Pri la kampanjo S-ano Cecilio de Carvalho diris: "Estou-lhe enviando o meu compromisso com essa entidade para a construção da nossa Sede Esperantista do Brasil, nessa bela Capital. Espero que todos apoiem essa grande iniciativa, a fim de que o Congresso Internacional Esperantista, que ocorrerá em Brasília, possa inaugurar nossa sede condignamente.

LA 66-A UK EN BRAZILJO

La direktorino de UEA por Latin-Ameriko, s-ino Ursula Grattapaglia, alve-

nus el Eŭropo kun bonegaj novaĵoj: UEA konfirmis, ke la 66-a UK okazos en nia lando, en nia ĉefurbo Brazilja, en la jaro 1981-a.

Kun plezuro ni konstatas, ke la tuta lando sin preparas por la evento. Tio ja estas grava kaj necesa ago, ĉar la tasko estas granda, la UK estas de ĉiuj brazilaj gesamideanoj kaj ni klopodos por ke ĝi iĝu unu el la plej elstaraj kongresoj en la historio de Esperanto-Movado. Ek al laboro!

La prezidanto de la UK estos la senatano D-ro José Lins de Albuquerque, samideano el ŝtato Ceará.

NOVAJ VICPREZIDANTOJ

Estis nomumitaj lastatempe la jenaj vicprezidantoj: Prof-ro D-ro J. M. Mabe-soone, prezidanto de Pernambuco Esperanto-Asocio; Prof-ro D-ro Ivo Sanguinetti, el Porto Alegre (RS); Konoleno Francisco Alves Mata, el Maceió (AL); kaj Lair Alves Moreira, el Promissão (SP).

MONO RICEVITA POR LA BULTENO

Kore ni dankas la kontribuulojn de niaj karaj samideanoj:

S. A. Antunes	Cr\$ 100,00
Cícero Barros Pimentel	200,00
D-ro Helio Aderne	150,00
D-ro Ivo Sanguinetti	500,00
Claudio Zimmermann	100,00
Sylvio Avelar Machado	200,00
Sumo	1.250,00

LA VICPREZIDANTO DE UEA EN BRAZILU

D-ro Prof-ro Carl Stöp-Bowits, unu el la direktoroj de la "Scienca Revuo", nuntempe eldonata en Brazilo, partoprenis la Sciencon Simpozion en Marilja.

Lia ĉeesto en la Simpozio estis granda honoro, ne nur por la evento sed ankaŭ por nia lando.

Laŭŝajne li sentis sin bone en Marilja. Je nia demando, kiel lin impresis nia lando, li respondis: "Tre plaĉas al mi via somera vintro", ĉar post la rigora vintro, kiun li spertis en Eŭropo, li plene ĝuis la agrablan sunbrilon en Marilja. Sendube plaĉis al li ankaŭ nia bongusta nutraĵo. Fine li konkludis "Brazilo estas lando de surprizoj". Li ŝatis la gastemon de la brazilanoj.

Post la Simpozio D-ro Stöp-Bowits faros rondvojaĝon tra Sud-Ameriko, ĉar kiel li diris, li intencas vojaĝi de la nordo ĝis la sudo de la terglobo. Li alvenis el Norvegio kunportinte kolorfilmon, kiu aperigas peceton de lia ĉefurbo Oslo.

Agrabla surprizo estis por nia elstara s-ano, ĉe la ekspozicio de la infandeseĝnaĵoj, kie li vidis desegnaĵojn de liaj samlandanaj etuloj.

Ni, en la nomo de ĉiuj esperantistoj de Brazilo invitis kore la vicprezidanton Stöp-Bowits partopreni la 66-an UK'n en Brazilja.

- x - x - x - x - x - x - x -

D-RO HELIO ADERNE

S-ano Aderne lernis Esperanton en la jaro 1969-a. Lia profesoro estis la bone konata kaj kompetenta generalo Padua, el Belo Horizonte.

Post la lernado de la internacia lingvo li malfermis sian Klinikon "Esperanto", kie li flegas malsanulojn dum ok jaroj kaj inter ili multajn malriĉulojn senpage. Pro lia bonfaro s-ano Aderne estas ŝatata de la popolo de tiu urbo. Li multe helpas la movadon en Brazilo. El propra poŝo subtenas la de li fonditan Brazilan Esperantista-Kuracista-Rondon, kies oficiala organo estas la "Medicina Heroldo". En la jaro

1979-a li ĉeestis la Internacian Sciencon Simpozion en Marilja kaj prezentis temon pri "Laborsekureco, Labormedicino kaj Esperanto".

- x - x - x - x - x - x - x -

MACEIÓ (AL) — Kun ĝojo ni konstatas la vigligon de nia movado en la ŝtato Alagoas.

Antaŭ multaj jaroj kelkaj konataj esperantistoj fondis societon en Maceió, sed ĝis nun ne aktivis vigle.

S-ano Kolonelo Francisco Alves Mata nuntempe faras bonegan propagandon pri la internacia lingvo Esperanto. Dank'al lia klopodo la "Conselho Estadual de Educação" aprobis unuanime la enkondukon de Esperanto en la lernejojn, por la gradoj 1-a, 2-a, kaj 3-a de edukado.

La Universitato de Maceió celas prepari futurajn profesorojn.

S-ano Prof-ro Paulo Amorim Cardoso, kiu instruas Esperanton en la Federacia Universitato de Fortaleza (CE), faris 22 prelegojn pri la internacia lingvo en pluraj lernejoj de Maceió, kio kontribuis efike por la venko de la enkonduko de nia kara lingvo en la tri gradojn cititajn.

Krom tiuj informoj estas ankaŭ la jenaj: 33 skoltoj el la kolegio "Maristas" enskribiĝis por lerni Esperanton; la Sekretariejo por Edukado kaj Kulturo faris konvencion kun Alagoas Esperanto-Asocio; kaj Centro pri Superaj Studoj de Alagoas invitis profesoron pri Esperanto por gvidi kurson en sia sidejo por profesoroj.

Estas laŭdinda la laboro de nia vicprezidanto Francisco Alves Mata. Pri lia klopodo prof-ro Amorim Cardoso verkis la jenan kvarversaĵon:

"O Mata é quem dá vida
ao Esperanto em Maceió,
e nessa sua investida
tem a paciência de Jó.

Ni gratulas al prof-ro Amorim Cardoso, kiun la Universitato de Fortaleza sendis je peto de la Universitato de Maceió.

Tiel agadas la vicprezidantoj de BKE. Estas imitinda ilia laboro. Gratulon!

- x - x - x - x - x - x - x -

PROMISSÃO (SP) — La IV-a Renkontiĝo de Esperantistoj okazis en tiu progresema urbo de la 17-18-a de marto pasinta. La eventon ĉeestis proksimume 100 personoj kaj estis organizita de San-Paŭlo Esperanto-Asocio. El la partoprenintoj 60 estis esperantistoj.

Pluraj vicprezidantoj de BKE ĉeestis ĝin, inkluzive nia senlaca batalanto Majoro Gilberto A. Silva Velho, kiu brile reprezentis la Brazilan Konsilantaron.

En la moderna sidejo de Tenisa Klubo estis realigita la inaŭguro de la evento. Ĉeestis ĝin pluraj lokaj aŭtoritatuloj, inkluzive la urbestro, s-ro Ivo Ferreira Grama kaj s-ro Edvaldo F. Pimentel, prezidanto de la ĉambro de Deputitoj. Prof-rino Elvira Fontes, prezidanto de San-Paŭlo Esperanto Asocio faris belan paroladon. Wilson Ferreira Martins, el Marilja (SP), prelegis pri la Scienca Simpozio, programita por Marilja kaj Prof-ro D-ro Walter Francini prezentis sian libron "Esperanto sen Antaŭjuĝoj", jam bone akceptita de la legantaro en Brazilo kaj ekster ĝi.

En sia parolado la urbestro Grama laŭdis la efikan laboron de S-ano Lair Alves Moreira, lia samurbano, kies klopodoj multe kontribuis por la sukceso de la renkontiĝo. Krom tio li elstarigis la gravecon de la esperanta interfraterniĝado, kiun li alte taksis.

Elstarigis ankaŭ la parolado de prof-ro Ivon Barbosa, el Bauru (SP), kiu laboras senĉese por la progreso de Esperanto en tiu riĉa regiono.

Estis decidite, ke la venonta renkontiĝo okazos en San-Paŭlo, kiam estos pri-trakta la maniero propagandi pri Esperanto en nia ŝtato. Ĉiuj menciitaj esperantistoj estas vicprezidantoj de BKE.

TRA BRAZILIO ...

RECIFE (PE) — Laŭ informo de nia vicprezidanto Amaro Pinangé Soares, en la 7-a de aprilo okazis balotado kaj elekto de nova estraro de la Pernambuco Esperanto-Asocio por la periodo 1979/1981. Jen la estraro elektita: Prezidanto: Prof-ro D-ro J. M. Mabesoone; vicprezidanto: Geraldo Pires Sitônio; ĝenerala se-

kretario: Amaro Pinangé Soares; vic-ĝenerala sekretario: João José de Lima Costa; kasisto: S-ino Maria José Pontes (reelektita); vic-kasisto: Raimundo F. de Andrade; bibliotekisto: Jorge Luiz de Oliveira Melo; konsilantoj: Amílcar de Souza Leão kaj Arnor Ribeiro Vasconcelos.

Ni gratulas la novan estraron dezirante sukceson kaj progreson.

RIO GRANDE (RS) — Informis nin nia vicprezidanto Kolonelo Dirceu Porciuncula, ke estis elektita nova estraro por la Esperantista Societo de Rio Grande. Jen la membroj: Prezidanto: Manoel Torres de Abreu; vicprezidanto: Domingos Caruso; 1-a sekretario: Dirceu Porciuncula; 2-a sekretario: S-ino Delair Dumont; 1-a kasisto: Duílio Calcagno; 2-a kasisto: Walde-mar Diniz; 1-a bibliotekisto: F-ino Flora Rios Calcagno; 2-a bibliotekisto: F-ino Sonia Esteves Guerra.

Ni gratulas la novan estraron dezirante efikan laboron.

ILHÉUS (BA) — Ni konstatas, ke nia vicprezidanto Eleus L. de Sá kontentige laboras por nia movado en la fama urbo Ilhéus. La Ilhéus Esperanto Grupo estas konsiderata de publika utileco, laŭ Leĝo 1188, de la 5-a de junio 1978, kaj ĝia direktoraro estas: Honora Prezidanto D-ro Olimpio Rhem da Silva, urbestro de Ilhéus; Prezidanto: Bakalaŭro Waldir Chagas; vicprezidanto: Eleus Leonardo de Sá; Sekretario: Janildo Souza Glaria; 2^o Sekretario: Walquiria Ferreira Lacerda; Kasistino: Suele Diacuí Sá; Bibliotekisto: Antonio Leonardo Sobrinho; Propagand-direktoro: Dr-ino Janete Mendonça Badaó.

Ni deziras sukceson al la nova estraro.

Ni ĝojas pro la gajnita premio, rilata al siaj naciingvaj versoj. Sinjoro Rodolfo Coelho Cavalcante skribis al nia s-ano Sá:

"Ao

Ilustre Irmão trovador.

Jornalista, vate Eleus,

Que espalha paz, amor,

Na linda cidade Ilhéus.

Ni kore gratulas al S-ano Leonardo de Sá.

INTERNACIA SCIENCA SIMPOZIO

Kiel estis programita, okazis en Marilja (SP) la unua Internacia Scienca Simpozio, kiu utilis nur Esperanton en siaj prelegoj. La eventon ĉeestis sciencistoj el diversaj landoj de tri kontinentoj: Eŭropo, Azio kaj Amerikoj: Norda kaj Suda.

La solena inaŭguro okazis en la 13-a de aprilo, en la Medicina Fakultato de Marilja, al kiu ĉeestis 70 personoj. La gazeto "Diário de Marília" publikigis artikolojn pri la afero kaj la radio distastigis daŭre la okazaĵon informante, ke la oficiala lingvo estas Esperanto.

Envenis reprezentantoj el 14 landoj. La sciencistojn el Brazilo reprezentis niaj s-anoj D-ro Prof-ro Geraldo Matos, el la Fakultato Katolika de Parana; D-ro Prof-ro Jannes Markus Mabeoone, el la Federacia Universitato de Pernambuco; D-ro Prof-ro Ivo Sanguinetti, el Porto Alegre (RS); D-ro Prof-ro Roberto Passos Nogueira, el Brazilja (FD); kaj D-ro Helio Aderne, el Belo Horizonte (MG). Kelkaj neesperantistoj ankaŭ ĉeestis, el la ŝtata Universitato de Marilja. La kunordiganto de la evento estis nia vicprezidanto Prof-ro Wilson Ferreira Martins, jam bone konata esperantisto, ne nur en Brazilo sed ankaŭ tra la mondo, kiu laboregis senĉese por la sukceso de la Simpozio.

Multe helpis lin niaj vicprezidantoj Lair Alves Moreira, el Promissão (SP) kaj Ivon Barbosa, el Bauru (SP). Aliajn informojn pli detalajn ni donos en nia venonta bulteno.

- x - x - x - x - x - x - x -

GOJANJO (GO) BEJO — Brazila Junularo Esperanto-Organizo renkontiĝis en februaro en ĉi tiu urbo, partopreninte 15 gejunuloj. Estas laŭdinda la fortostreĉa klopodo de nia juna s-ano Fabricio Rodrigues Vale. Li laboris serioze por organizi ju pli bone la renkontiĝon. Eble la granda distanco malhelpis la junularon pli amase veturi tien.

S-ano Adail Sobral faris entuziasman panorladon. Estis pritraktitaj la temoj: "La Horamaj Rajtoj" kaj "lingvistiko aliaj aktualaj.

BRAZILJA (FD) — La gazeto "Correio Brasiliense" en sia ekzemplero de la 29-a de marto pasinta aperigis artikolon pri la Universala Kongreso okazonta en nia ĉefurbo, en la jaro 1981-a. La informojn donis s-anoj Nelson Pereira de Souza kaj Carlos A. S. da Cunha, ambaŭ direktoroj de nia Konsilantaro kaj de Brazilja Asocio de Esperanto.

Ili ankaŭ informis, ke estas nova Esperanto-kurso en "Centro de Ensino Unificado de Brazilja" — CEUB. Ambaŭ multe laboras por la progresigo de nia movado en Brazilo.

- x - x - x - x - x - x - x -

ACESITA (MG) — Pri la SKOLTA MOVADO, la reprezentanto de la Skolta Esperanto-Ligo, nia vicprezidanto D-ro Adonis S. Silva, sciigas nin, ke li disponas pri Instrumetodo por Skoltoj. Jamboreja lingvo, kies prezo por la interesatoj estas: po Cr\$ 35,00. Por pli ol 10 ekzempleroj estos rabato de 25%. Li ankaŭ vendas insignojn de Skolta Esperanto-Ligo. Lia adreso: Caixa Postal Nº 192 - CEP 35.180 - Acesita (MG). Laŭ la sciigoj de nia s-ano Mata, el Maceió (AL), certe ni havos baldaŭ fortan skoltan Esperanto-movadon en Brazilo.

BADEN POWELL: Creador do Escotismo



Desenho de Dena de Wilson Vêado

SANTOS (SP) — Com relação ao nosso **BOLETIM INFORMATIVO**, queremos destacar que muitos de nossos leitores estão nos escrevendo elogiando o nosso informativo. Dizem que ele é bem apresentado, tem boas informações, é constante nas mãos dos nossos coidealistas, dando notícias de todo o Brasil.

Nós agradecemos os gentis elogios e informamos que esses elogios cabem não somente a nós, mas também ao "Centro de Cópias Cerqueira" que o compõe e imprime. O senhor Cerqueira, amante da cultura e do progresso, está sempre melhorando sua maquinaria impressora e consequentemente o trabalho que faz. Os esperantistas agradecem a ajuda, inclusive de sua competente equipe de trabalho.

História da Imprensa de Santos, ora vendido em todas as livrarias de Santos.

O veterano jornalista Olo Rodrigues acaba de publicar a "História da Imprensa em Santos", importante trabalho que recorda, desde a sua fundação, a imprensa santista, citando os diversos órgãos de publicidade aparecidos em nossa cidade, entre os quais quis ressaltar a presença do nosso Boletim Informativo, que já penetrou no seu quinto ano de existência, citando: "Desde janeiro de 1975, pelo menos numa só gráfica — o Centro de Cópias Cerqueira — O Conselho Brasileiro de Esperanto de Santos, rua Galeão Carvalhal, 31 e secretaria em Brasília, vem publicando seu Boletim Informativo, órgão oficial do Brasileira Konsilantaro de Esperanto. Redação de M. Almada. Para os esperantistas em geral, o órgão representa leitura sobremodo interessante. Santos, por sinal, é o grande esteio do Esperanto pela extraordinária atuação dos Almada."

Composto e impresso no Centro de Cópias Cerqueira. Há um livro muito interessante, o **Esperanto Elementar**, do incansável F. S. Almada. É o catecismo do Esperanto. Quando encerramos a redação deste livro, a 31 de outubro de 1978, havia sido publicado um mês antes, o número 38, ano quarto, de "Esperanto", dirigido por Maria Almada. — O livro se encontra nas livrarias de Santos.

- x - x - x - x - x - x - x -

UBERABA (MG) — Okazos de la 19-a ĝis la 22-a de julio venonta, en Uberaba, la 14-a Brazila Seminario de Esperanto promociita de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj. La kotizoj ĝis la fino de la kuranta monato: Cr\$ 300,00; poste ĉi tiu dato, Cr\$ 400,00 por ĉiuj. Akompanantoj kaj junuloj ĝuas la rabaton de 50%. Oni sendu la aliĝilojn al Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Av. 13 de Maio, 47 sobreloja 208 aŭ poŝkesto 1887 - CEP 20.000 - Rio de Janeiro (RJ).

- x - x - x - x - x - x - x -

GOJANJO (GO) — PROF-RO D-RO RAUL CONDE

D-ro Conde lernis Esperanton en 1960, en Gojanjo. En tiu tempo li vidis sur iu ŝarĝakamiono la vorton "Esperanto". Li kuriozis pri ĝi kaj serĉis en iu revuo klarigojn pri la internacia lingvo. Ĉar la ideo lin allogis kaj plaĉis al li, li tuj eklernis la lingvon. Kiel universitata profesoro facile li ĝin ellernis kiel memlernanto. Post li fondis klubon en la urbo, instruas kaj organizis regionajn renkontiĝojn, kiujn li prezidis.

En Belgio li visitis kurson en la Somera Universitato. Ankaŭ li helpis aĉeti la sidejon en Gojanjo.

Kompetenta esperantisto, s-ano Raul Conde estas nia vicprezidanto kaj asidua vizitanto de la esperantaj rekontiĝoj en Brazilo. Li estas bonega ekzemplo por ni ĉiuj.

- x - x - x - x - x - x - x -

LAVRAS (MG) — Nia vicprezidanto kaj laborema s-ano **LUIZ TEIXEIRA DA SILVA**, en la urbo Lavras jam de longe aktivas. Li lernis Esperanton en la jaro 1940-a. Memlernanto di dum multaj jaroj laboris tutsola en Lavras. Li fondis la Esperanto-Klubon de Lavras, kie li instruas la lingvon al multaj personoj.

Li inauguris magazinon nomitan "Esperanto" kaj tiam lotumis biciklon inter la ĉeestantoj por pli bone propagandi pri Esperanto. Por rajtigi la premion li starigis demandon al la konkursanoj pri la internacia lingvo. Kiel bona desegnisto, li pere de desegnaĵoj instruas Esperanton. S-ano

Teixeira estas unu el la fortaj subtenantoj de nia movado.

Ankaŭ de nia kunlaboranto Teixeira da Silva ni ricevis la interesan gazeteltranĉaĵon el "O Estado de Minas Gerais". kiu aperigis en sia ekzemplero de la 20-a de februaro 1929 signifan sciigon pri la enkonduko de Esperanto ĉe filmoj parolantaj, kio tamen, tiam ne ekzistis. Jen kion ĝi informis:

"Quando os filmes forem falantes...": esta matéria na primeira página comentava a estranha possibilidade do uso do Esperanto em filmes falados, provocando entusiasmo nos círculos esperantistas de BH, principalmente em seu líder Ary Theodolindo. Esses rumores vinham dos Estados Unidos depois que Joseph R. Scherer, presidente do "Club Esperanto de Los Angeles" visitou o estúdio da Metro Goldwyn. O diretor deste último, Sr. Fred Niblo, em entrevista a um grande

jornal americano havia declarado: "Nunca tive tempo para estudar o Esperanto — disse o sr. Fred Niblo. Não precisava então dessa língua. Mas, como agora os filmes falantes estão interessando o mundo inteiro, surgiu um novo problema. É um sério problema de que depende a continuação de nossos sucessos na Europa. A língua inglesa não é desejada na Europa continental. Uma língua auxiliar é necessária para os nossos filmes falantes. É uma questão financeira, questão de dinheiro...

Entre os artistas que teriam de aprender o Esperanto (o que não aconteceu, pois foram criadas as legendas com tradução das falas) estavam Norma Shearer, John Gilbert, Ramon Novarro, William Haines, Lewis Stone, Lionel Barrymore, Greta Garbo e Conrad Nagel, todos artistas da Goldwyn.

SAN-PAULO (SP) — Nia sam-ino kaj poetino Fanny Luiza Dupré sendis al ni kunlaboraĵon, kiun ŝi trovis interesa, laŭ ŝia poeta sento, kiu estas tre taŭga por la jaro de la infano. Jen ĝi:

O que é . . . o que é
O que é um menino?

Um menino, minha gente, é gente,

Gente que não para um minuto;

Um menino, é um engenheiro, um médico, um cientista, um artista, um cantor,

Um padre, um técnico da NASA, um aviador de avião super-sônico: pelo menos, em sonho

Um menino é uma vidraça partida, um carro rabiscado com dedo sujo de graxa,

é uma bicicleta desmontada, uma parede rabiscada que ninguém soube quem foi.

Um menino, é uma porção de lágrimas escorrendo pelos olhos brilhantes por causa de

um carrinho ou uma bicicleta, que o pai não quis dar.

Um menino, é filósofo que faz perguntas muito sérias. . .

Um menino, é um psicólogo que percebe quando o esquecemos nos diz que ele

gosta mais da gente, do que a gente dele.

Um menino, é um amigo que gosta tanto da gente que às vezes nem percebemos que

ele é uma das coisas mais importantes que há na terra.

Um menino, é uma sineta tocando, que no fim a gente vê que não era ninguém.

Um menino, é uma gargalhada na hora errada, que deixa os pais sem graça quando

vem uma visita.

Um menino, é uma bola de futebol, acordando o pai cansado que precisa dormir um pouco mais.

Um menino, é um cabelo de irmão trançado e um grito de raiva, depois de uma

repreensão e uma briga, e no fim um beijo e um abraço.

Um menino, é uma dor de cabeça que parece o fim do mundo, e uma ferida que não parece nada e assusta a mãe.

Um menino, é um tapete sujo na sala, uma geladeira aberta, um telefone fora do gancho, um brinquedo desmontado, uma palavra ingrata e depois um agrado sem pedido de desculpa.

Um menino, é um pai que volta do trabalho e encontra um amigão para lhe dar o abraço ou para sentar-se no seu colo e contar o que fez durante o dia.

Um menino é um homem em potencial, uma certeza do amanhã, um amor sedento

um carinho disponível, uma opinião forte da liberdade, um pedaço de

amanhã plantado no hoje

Um menino, é o amor vivendo os primeiros dias de uma eternidade

Ni dankas tutkore